


# Esperanto por UN

## Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 56, januaro-februaro 2022



Universala Esperanto-Asocio



### 10 decembro – Homrajta Tago 2021: UEA substrekiĝis sian historion

Universala Esperanto-Asocio denove mesaĝis subtene al Unuiĝintaj Nacioj okaze de Homrajta Tago 2021 – dum periodo kiam atakoj kontraŭ homaj rajtoj ŝajnas pli kaj pli oftaj.

La nuna mesaĝo rigardas al la historio de la Asocio, kiu emfazis homajn rajtojn ekde la komenco de la 113 jaroj de la historio de la Asocio: “Kiam Hector Hodler fondis Universalan Esperanto-Asociacion en 1908, homaj rajtoj formis parton de la internaciista tagordo de la Asocio ekde la komenco: Hodler forte kredis je toleremo, egaleco (inkluzive de genra egaleco) kaj pacaj rilatoj inter nacioj. Li konsideris Esperanton ilo por realigi tiujn idealoj.” La Asocio fondiĝis en Svislando, hejmlando de la internacia paca movado tiutempa, kaj de internaciaj organizoj kiel ekzemple la Ruĝa Kruco kaj la

Universala Poŝta Unio.

Post la Dua Mondmilito kaj la tragika vivoperdo ne nur en la milito mem sed ankaŭ inter nebatantoj, inkluzive de viktimoj de la Holokaŭsto kaj la kampanjo de Stalin kontraŭ esperantistoj, la Asocio ree emfazis sian apogon al homaj rajtoj: “Respekto de homaj rajtoj estis formale inkluzivita en la bazajn principojn de Universala Esperanto-Asocio kiam, en sia unua kongreso post la Dua Mondmilito, en Berno en julio-aŭgusto 1947, ĝi aprobis rezolucion kiu deklaris, ke respekto de homaj rajtoj estas esenca kondiĉo por la laboro de la Asocio. Sekve, unu jaron poste, ĝi entuziasme bonvenigis la novaĵon, ke akceptiĝis la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.”

“Respekto de homaj rajtoj daŭras kiel fundamenta kondiĉo de la laboro de UEA,” kiel klarigis la mesaĝo de UEA okaze de la Homrajta Tago. “La Asocio favore notas la atenton al homaj rajtoj en la lastatempa plano por la estonteco, *Our Common Agenda* (Nia Komuna Tagordo), de Ĝenerala Sekretario António Guterres, kiu alvokas al ‘renovigita socia kontrakto ankrita en homaj rajtoj.’”

La mesaĝo citis la deklaron de Ĝenerala Sekretario Guterres, kiu rimarkigis, ke “homoj deziras esti aŭdataj kaj partopreni en decidoj, kiuj koncernas ilin.” Kiel la mesaĝo de UEA klarigis, “Ili povas utiligi la rajton esti

aŭdata nur se Unuiĝintaj Nacioj aŭskultos en iliaj lingvoj, kaj nur se UN esploros ĉiujn lingvajn rimedojn, inkluzive de la Internacia Lingvo, en la serĉado de aŭtentika kaj substanca dudirekta komunikado.”

La mesaĝo de UEA aparte emfazis la lingvan aspekton de la homaj rajtoj: “Tro multa tutmonda komunikado venas de supre suben. Ni devas, en la spirito de Hector Hodler kaj de la hodiaŭa movado por Esperanto, respekti tiun parton de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu postulas lingvan egalecon.”

La mesaĝo finiĝis per jenaj vortoj: “La Esperanto-movado, modelo de internacia civila socio, estas ligita al neniuj registaro, subigita al la politika tagordo de neniuj landoj, kaj kovras la tutan mondon, kun parolantoj en la plejparto de la landoj de la mondo. Nia Asocio daŭrigos sian kunlaboron kun Unuiĝintaj Nacioj kaj kun ĉiuj homoj de bona volo por krei tiun etoson de konfido kaj de respekto por homaj rajtoj, kiun la tuta mondo tiel forte deziras kaj bezonas.”

Ankaŭ la 15-an de decembro, festante la naskiĝtagon de L. L. Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, UEA reasertis la celon utiligi tiun internacian lingvon kiel vojo al kunlaboro, konstruado de konsentoj kaj internacia kompreniĝo. En aparta mesaĝo, nia asocio subtenis la alvokon de s-ro António Guterres pri nova multflankismo, por "konstrui daŭripovajn, inkluzivajn sociojn kaj ekonomiojn, bazitajn je homaj rajtoj kaj homa digno por ĉiuj."

## **Unua informkunveno de la Komitato pri Lingvo kaj Lingvoj**

Ducento da personoj ĉeestis la unuan informkunsidon de la nova Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj (NGO Committee on Language and Languages) la 7-an de decembro. La virtuala kunsido havis kiel temon “Multlingvismo kaj Unuiĝintaj Nacioj: Politiko, Praktiko kaj Perspektivoj.” Ĉefparolanto estis la Ĝenerala Subsekretario por Funkciigo de la Ĝenerala Asembleo kaj Konferencoj, Lia Ekscelenco Moses Abelian. S-ro Abelian samtempe rolas kiel Kunordiganto de Multlingvismo ĉe UN. Li emfazis la fakton, ke inter la prioritatoj de la Ĝenerala Sekretario de UN, s-ro António Guterres, estas politiko de multlingvismo kiu inkluzivu ĉiujn elementojn ene de UN kaj ankaŭ la vastan publikon. Post s-ro Abelian parolis s-ino ambasadorino Rabab Fatima, el Bangladeŝo, la lando kiu iniciatis la t.n. Patrilingvan Tagon de UN, kaj s-ino Mita Hosali, de la Departemento de UN pri Tutmonda Komunikado.

Ĉefa rolanto en la formado de la nova komitato estas Universala Esperanto-Asocio kaj ties reprezentantoj ĉe UN Humphrey Tonkin kaj Francis Hult. Profesoro Hult parolis nome de UEA, kaj parolis ankaŭ reprezentantoj de la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj kaj la Internacia Federacio de Tradukistoj. Entute 22 neregistaraj organizoj konsistigas la fondajn membrojn de la Komitato, kiu nun planas sian duan kunsidon, kiu okazos espereble en februaro 2022.

## UEA reelektiĝis al la estraro de CoNGO

“Doni fortan rolon al neregistaraj organizoj kaj al la civila socio ĝenerale estas esence por la sana evoluo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu frontas defiojn kiuj tuŝas ĉiujn nivelojn de la monda komunumo.” Tiel komentis Humphrey Tonkin, Novjorka reprezentanto de UEA al Unuiĝintaj Nacioj, okaze de la reelektiĝo de la Asocio al la estraro de CoNGO, la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Statuso kun Unuiĝintaj Nacioj. CoNGO aparte okupiĝas pri la reciproka rilato inter UN kaj ties Ekonomia kaj Socia Konsilio unuflanke kaj civilsociaj organizoj aliflanke.

La Asembleo de CoNGO okazas ĉiun trian jaron kaj traktas interalie la elekton de prezidanto kaj aliaj funkciuloj, inkluzive la estraron. La Asembleo, kiu okazis fine de novembro kaj komence de decembro, parte virtuale kaj parte ĉeeste, aŭdis mesaĝojn de la Ĝenerala Sekretario de UN, s-ro António Guterres, la prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de UN, ambasadoro Abdulla Shahid, kaj la prezidantino de la Ekonomia kaj Socia Konsilio, ambasadoro Collen Vixen Kolepile. Apartan ĉefparoladon faris la Ĝenerala Direktoro de UN-Ĝenevo, s-ino Tatiana Valovaya. Kiel prezidanto de CoNGO reelektiĝis d-ro Liberato C. Bautista, reprezentanto de la Ĝenerala Komitato pri Eklezio kaj Socio de la Unuiĝinta Metodista Eklezio, kaj kiel vicprezidanto Cyril Ritchie, reprezentanto de la Unio de Internaciaj Asocioj.

## UEA observis la Mondan Tagon de Infanoj

“Konstrui la estontecon NUN” formis la esencon de mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Monda Tago de Infanoj, 20 novembro 2021. La Asocio aparte laŭdis la laboron de la Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Infanoj (UNICEF): UNICEF “estis kreita jam en 1946, do frue en la historio de UN. Ĉi-jare ĝi fariĝas 75-jara. Ĝia vibra kaj trafa intervenado por protekti infanojn tra la mondo memorigas al ni kiom gravas la protektado de rajtoj de infanoj ĉie, kaj gravas la rolo de UN en tiu protektado.”

“Ĉiu infano rajtas ĝui bazajn servojn kaj profiti okazojn por sia plena disvolviĝo,” la mesaĝo notis. “Protektado kaj zorgo de infanoj estas universala bazo por paco, homaj rajtoj kaj daŭripova evoluigo... Antaŭ la pandemio KOVIM-19, ĉirkaŭ unu el kvin junuloj diris, ke ili jam sentas deprimon. Kaj la pandemio pligrandigis sentojn de necerteco, soleco kaj malĝojo. Pro tio, registaroj devas pli forte financi iniciatojn pri la mensa sano de junuloj.”

“Per Esperanto, Universala Esperanto-Asocio kaj la esperantista junulara organizo TEJO instigas al amikeco kaj komprenemo inter junuloj de la tuta mondo. Per Esperanto, junuloj povas partopreni en volontulaj agadoj; kunveni por paroli pri siaj vivoj, studoj kaj defioj; agadi en internaciaj organizoj; kaj multe pli. Praktikante unu internacian lingvon sendependan de unuopa nacieco, ili aliĝas al aŭtentike tutmonda movado kie ili povas lerni kaj praktiki principojn de internacieco, tutmondeco, kaj komuna laboro por krei pli bonan mondon.”

## UEA kunordigas projekton pri daŭripovo kaj transporto

Ĝus finiĝis en Parmo (Italio) la unua projekta kunsido de VERDEN, nova projekto financata de Eŭropa Unio (EU) kaj kunordigata de Universala Esperanto-Asocio.

Daŭripoveco estas grava temo en la nuntempa socio, kiun UEA jam plurfoje traktis, ekzemple kadre de Universalaj Kongresoj (UK) kaj fakaj eventoj. La Asocio kunordigis la pretigadon de la faka Gvidlibro pri la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj, [aĉetebla](#) ĉe la Libroservo de UEA kaj [elŝutebla](#) el la retejo de la laborgrupo Esperanto por UN. En 2019 UEA ankaŭ starigis novan fondaĵon, [Klimato](#), por kompensi karbon-emision pro la okazigo de UK-oj ([uea.org/alighoj/donacoj/co2](http://uea.org/alighoj/donacoj/co2)).

La projekto VERDEN okazas kunlabore kun Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEF), faka asocio aliĝinta al UEA, kaj Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI), faka sekcio de TEJO, kun la subteno de Parma Esperanto-Grupo kaj Flandra Esperanto-Ligo. Ĝi fokusiĝas pri internacia kunlaboro pri daŭripoveco kaj transporto.

VERDEN havas duoblan direkton: de unu flanko ĝi celas antaŭenigi verdajn daŭripovajn kutimojn, kaj de la alia montri, ke per Esperanto eblas trakti seriozajn temojn kaj havi signifan efikon. “Nia unua statuta celo estas disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto. Tiu ĉi faka projekto instigas nian movadon kunlabori pri tre grava temo kaj sekve kuraĝigas nin aliri la eksteran mondon, gazetaron, aliajn organizaĵojn, politikistojn, kaj montri la rezultojn de internacia kunlaborado per Esperanto,” komentas Francesco Maurelli, kiu kunordigas la projekton nome de UEA.

Unu el la celoj de la projekto estas pretigi manlibron kun konkretaj, uzeblaj konsiloj por organizantoj de renkontiĝoj kaj aliaj aktivuloj.

Kadre de la sama subvenciprogramo Germana Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Nederland ankaŭ komencis alian EU-financatan partneran projekton kun fokuso pri daŭripoveco, pro kio UEA gratulas al siaj du landaj asocioj.